



Gebeneluksa Kongreso

Germana-beneluksa kongreso
2 - 5 oktobro 2025 Schleiden (DE)

Kongreslibro **TEMO: TRANSLIME**



Salutvorto de la prezidanto de GEA

Bonvenon al Schleiden-Gemünd!

La ideo de Germana Esperanto-Kongreso jam ĉiam ŝajnis al mi oksimora, ĉar kunveno inter Esperanto-parolantoj ja esence estu inter-nacia. Germanoj inter si povas paroli la germanan (kaj cetere tion faras en Germanaj Esperanto-Kongresoj). Tial, la nuna estraro de Germana Esperanto-Asocio strebis internaciigi la kongresojn de la asocio. Post la tre sukcesa Eŭropa Esperanto-Kongreso en 2024, kiun iniciatis franc-germana kunlaboro, ni denove volis elpaŝi internacie. Pro tio, ke pluraj membroj volis havi pli etosplenan “kunvivan” kongreson, nia celo estis malpli granda kongreso en unu ejo, kie oni povas okazigi programon kaj kune loĝi – iom laŭ la modelo de la kongreso en Brunsvigo en 2023, sed ĉi-foje kunlabore kun najbara lando.

Dum la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Strasburgo konatiĝis aktivuloj de la Valona Esperanto-Organizo (V.Esp.O) kaj de Germana Esperanto-Asocio kaj dum komuna vespermanĝo, ni decidis kunigi niajn fortojn por realigi komunan kongreson. Tiel, la kutima beneluxsa kongreso kunfandiĝis en 2025 kun la germana kaj kreiĝis german-beneluxsa, do, gebeneluxsa kongreso kun la temo “Translime” – temo, kiun ni ne nur traktas teorie, sed ankaŭ vivas praktike per nia translima kunlaboro. Ni povas vidi

aspektojn de tiu temo tute konkrete per nia vizito al Neŭtrala Moresneto, kie kun la nomo Amikejo iniciatiĝis Esperanto-ŝtato.



Ni tie vizitos ankaŭ la trilandan punkton inter Belgio, Germanio kaj Nederlando. Tiuj landoj (kune kun Luksemburgio, Francio kaj Italio) estis komenco kaj estas daŭra motoro de la eŭropa kunlaboro en kaj ekster la Esperanto-movado. Okdekjara paco en tiu ĉi mondoparto estas mirinda akiraĵo, se oni studas la antaŭan historion, pri kiu troveblas spuroj en tiu ĉi regiono. La paca aspekto de translimeco ricevos specialan atenton dum nia kongreso. Ni daŭre klopodu, ke tiu paco estu daŭripova kaj ke la limoj inter niaj landoj ĉiam malpli sentiĝu. Ke Esperanto estas grava faktoro en tia translimeco estas memkomprenebla.

Mi dankas niajn valonajn amikojn, ke ili akceptis kunlabori kun ni. La kuna agado okazis en serena etoso kaj dum la oftaj virtualaj kaj la kelkfojaj realaj renkontiĝoj, ni sentis nin kiel translima rondo familia – etoso, kiu certe sentiĝos dum la kongresaj tagoj.

Mi deziras al vi tre belan gebeneluxsodon!

Martin Haase

Salutvorto de la prezidanto de V.Esp-o

Saluton al ĉiuj,

Nome de la Valona Esperanto-asocio (V.Esp-o) mi bonvenigas vin al ĉi-tiu speciala kongreso: la **Gebeneluksa** Kongreso. Tia stranga nomo bezonas kelkajn klarigojn, ĉefe por la ne-belgoj. Oni memoru, ke Belgio estas en si mem stranga lando. Oni parolas tri oficialajn lingvojn: la nederlandan, la francan kaj la germanan, kaj la lando estas dividita en tri malsamaj regionoj: Flandrio, Valonio kaj la regiono de Bruselo. Kaj ĉiu lingva komunumo kaj regiono havas sian propran parlamenton, krom federacian parlamenton, do entute sep parlamentojn kun siaj propraj ministroj; ĉio ĉi kondukas al la plej alta koncentriĝo de ministroj po kvadrata kilometro en la mondo! Tamen la lando funkcias.

La esperanta movado ne povas eviti ĉi tiun belgan apartecon, kaj estas tri malsamaj esperantaj asocioj: la flandra (FEL), la brusela (EBG) kaj la valona (V.Esp-o). Ĉiujare unu el du pli grandaj asocioj organizas la **Beneluksan** Kongreson. Ĉi-jare estas la vico de V.Esp-o. La **Beneluksa** Kongreso estas la kongreso de Belgio, Nederlando kaj Luksemburgio samtempe.

Speciale ĉi-tiun jaron, ni aldonas **Germanion**, kio okazigas la **Ge-beneluksan** Kongreson.

Kutime oni ne komparas Belgion kaj Germanion kaj estas du landoj de tro malsamaj grandecoj, sed ni havas komunan limon kaj ankaŭ



iom da komuna historio. Kaj ĝuste ĉi tiun malgrandan pecon de komuna historio ni ekvidos kune dum ĉi tiu kongreso: la teritorio de Neŭtrala Moresnet. Tiu eta teritorio, inter Belgio kaj Germanio, kiu de 1816 ĝis 1919 apartenis al neniu lando, kiu volis deveni aparta teritorio kun iu internacia lingvo: Esperanto.

Eble ni vidos dum tiu ĉi kongreso, ke inter Belgoj kaj Germanoj estas pli ol komuna limo, pli ol iu iama teritorio, sed deziro konstrui komunan estontecon ene de Eŭropo kiu serĉas sin mem. Kaj ni, esperantistoj, estas tre bonŝancaj havi komunan trezoron, kiun la tuta mondo penas rekonii: nian komunan lingvon.

Mi deziras al vi tre bonan Gebeneluksan kongreson, kaj mi volas denove danki la estraron de la germana asocio por la propono al ni de ĉi tiu komuna kongreso, kies temo, ni ne forgesu, estas: Translime.

Jean Annet

Praktike

Bazaj informoj

Jugendherberge Gemünd Vogelsang
im Nationalpark Eifel

Im Wingertchen 9 · 53937 Schleiden

Tel. +49 2444 91492-0 ·

Vifio

En la junulargastejo mem kaj en la salono en la aparta gastejo estas rapida retaliro per vifio. La kodon vi trovos ĉe la enirejo.

Fotoj

Ni kreis komunan fotaron. Vi povas alŝuti al ĝi ankaŭ viajn fotojn!

mallonge.net/fotaro-GEBNLK2025

Kontaktoj de la LKK

Jen la telefonnumeroj de kelkaj LKK-anoj kiujn vi povas kontakti dum la kongreso por urĝaj aferoj:

- Jean Annet: +32 495 10 32 30
- Martin Haase: +49 171 708 55 25
- Valère Doumont: +32 485 51 75 52
- Andreas Diemel: +49 170 2809 371
- Yves Nevelsteen: +32 472 106 086

Dankon pro via partopreno en nia kongreso!



Programo

ATENTU! La programo de ĉi tiu kongreslibro estas provizora. La plej aktualan programon vi trovos sur la afiŝtabulo ĉe la enirejo de la kongresejo kaj en <https://benelukso.eu/kongreso>



ĴAŬDO 2 OKTOBRO

14:00	Junulargastejo malfermita
15:00 – 16:00	Gvidata prezento en Esperanto de la ekspozicio “Rezisti al la milita propagando” fare de Eric Nemes
16:00	Akceptejo malfermita
16:00 – 18:00	Kurso de Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge
16:00 – 18:00	Kantateliero de Zdravka Boytcheva
16:00 - 17:30	Esperanto kaj partneraj urboj – prelego de Detlef Haußner
17:30 – 18:30	Biergustumado far Valère Doumont



18:30 – 20:00	Vespermanĝo
20:00 – 22:00	Interkona vespero
22:00 – 24:00	Gufujo (memzorga)

Programo

VENDREDO 3 OKTOBRO

08:00 – 08:30	Gimnastiko kun An Olijslagers
08:30 – 09:30	Matenmanĝo



09:30 – 11:30	Paroliga kurso de Kristin Tytgat
09:30 – 11:30	Kurso de Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge
09:30 – 11:00	Ĝenerala asembleo de Valona Esperanto-Asocio
09:30 – 10:00	Prelego: Detruo kaj rekonstruo - sekvoj de la vetera katastrofo en Eifel-montaro Julio 2021
10:00 – 11:30	Ĝenerala asembleo de fervojistoj-esperantistoj
09:30 – 11:30	Kantateliero de Zdravka Boytcheva
11:00 – 11:15	Akceptejo malfermita
12:00 – 13:30	Tagmanĝo
14:00 – 17:00	Ĝenerala asembleo de Germana Esperanto-Asocio
14:00 – 17:00	Ĝenerala asembleo de Belga Esperanto-Federacio

Programo



14:00 – 17:00	Migrado kun Harald Schmitz de ĉ. 8 km de la junulargastejo ĝis la Urft-retendigo. Enkonduko/prelegetoj pri la regiono kaj la digo 1) komence de la migrado apud la junulargastejo kaj 2) poste ĉe/sur la digo. Pro piediraj problemoj Harald akompanos la grupon per biciklo.
17:00 – 18:00	Rezisti la militan propagandon – prelego de Anne Morelli (en la franca kun traduko al Esperanto)
17:00 – 18:00	AGEI-jarĉefkunsido
18:00 – 18:15	Akceptejo malfermita
18:30 – 19:30	Vespermanĝo
19:30 – 20:00	Solena malfermo
20:00 – 21:30	Koncerto de JoMo!




22:00 – 24:00	Gufujo (memzorga)
---------------	-------------------

Programo

SABATO 4 OKTOBRO

08:00 – 08:30	Gimnastiko kun An Olijslagers
08:30 – 09:30	Matenmanĝo
09:30 – 11:00	Prelego de Bernard-Regis Larue: Euregio kaj Moresnet
09:30 – 11:00	Kurso de Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge
09:30 – 11:00	Kantateliere de Zdravka Boytcheva
11:15	Eko de la ekskurso per buso
12:00 – 13:30	Tagmanĝo / pikniko
11:15 – 19:00	Ekskurso al Moresnet: kvarlanda punkto + zinkomuzeo



13:30 – 18:00	Libera ekskurso al Vogelsang, iama lernejo de la nazioj
18:30 - 19:30	Vespermanĝo
20:00 - 20:30	Koruso de la Kantateliere
20:30 - 21:30	Koncerto de la juna bando Mezbakita
22:00 - 24:00	Gufujo (memzorga)

Programo

DIMANĈO 4 OKTOBRO

08:00 – 08:30	Gimnastiko kun An Olijslagers
08:30 – 09:30	Matenmanĝo
09:30 – 11:30	Paroliga kurso de Kristin Tytgat
09:30 – 11:30	Kurso de Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge
09:30 – 11:30	Kantateliero de Zdravka Boytcheva
09:30 – 10:30	Kunveno de uzantoj de Eventa Servo sub gvido de Yves Nevelsteen.
09:30 – 10:30	Publika kunveno de Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE)
10:30 – 12:00	Prelego de Ulrich Lins: La instruo de persekutoj – la aktualeco de Esperanto.
12:00 – 12:45	Tagmanĝo
14:00	Fino de la kongreso



Ĉu vi konas la Internacian Kalendaron de Eventa Servo? Ĝi donas super-rigardon de la ĉefaj Esperanto-eventoj tutmonde.

<https://eventaservo.org/kalendaro>

Neŭtrala Moresnet

Unika mikroŝtato en la koro de Eŭropo

Situanta ĉe la kruciĝo de Belgio, Nederlando kaj Germanio, Neŭtrala Moresnet estis unika teritorio, kiu ekzistis de 1816 ĝis 1919. Tiu ĉi mikroŝtato, naskita el la post-napoleonaj rivalecoj, proponas fascinan paĝon de la eŭropa historio.

Originoj de Neŭtrala Moresnet

Post la falo de Napoleono, la Viena Kongreso en 1815 redeseĝnis la mapon de Eŭropo. La regiono de Moresnet, riĉa je zinka erco, fariĝis punkto de malkonsento inter la Reĝlando de Nederlando kaj la

Reĝlando de Prusio. Ne kapablaj interkonsenti pri la posedado de la zinkominejo *Vieille Montagne*, la du ŝtatoj en 1816 decidis krei neŭtralan, kune administratan teritorion ĉirkaŭ la vilaĝo Kelmis (*La Calamine*).

Speciala statuso

Neŭtrala Moresnet kovris areon de nur 3,5 km². Malgraŭ sia malgranda grandeco, ĝi havis propran flagon, siajn poŝtmarkojn kaj komunan belgo-prusian administradon. La entrepreno kaj la loĝantoj ĝuis impostajn avantaĝojn kaj escepton je militservo, kio allogis kosmopolitan loĝantaron.



Lingva eksperimento: Amikejo

En 1908, la doktoro Wilhelm Molly proponis fari el Neŭtrala Moresnet la unuan ŝtaton, kie oni uzus ekskluzive Esperanton, sub la nomo *Amikejo*, signifanta “loko de amikeco”. Kvankam tiu projekto neniam realiĝis oficiale, ĝi atestas la progresisman kaj internaciisman spiriton de la teritorio.

La punkto de kvar landlimoj


Apud Neŭtrala Moresnet troviĝas la monto Vaalserberg, la plej alta punkto de Nederlando. Inter 1830 kaj 1919, tiu unika loko estis la sola punkto en la mondo kie kvar politikaj entoj renkontiĝis: Belgio, Nederlando, Prusio (poste Germanio) kaj Neŭtrala Moresnet. Hodiaŭ, kvankam Neŭtrala Moresnet malaperis, la loko restas simbolo de la komplekseco de la eŭropaj limoj.

Fino de la sendependeco

La Unua Mondmilito markis la finon de Neŭtrala Moresnet. En 1919, la Traktato de Versailles definitive integris la teritorion al Belgio, finigante pli ol jarcenton da neŭtraleco.

Heredaĵo kaj memoro

Hodiaŭ, Kelmis (*La Calamine*) konservas la memoron pri tiu unika pasinteco. La muzeo de *Vieille*



Montagne rakontas la historion de la zinkominejo kaj de la neŭtrala teritorio. Monumentoj kaj informtabuloj ebligas al vizitantoj malkovri tiun malmulte konatan paĝon de la eŭropa historio.

Vizito al Neŭtrala Moresnet kaj al la punkto de kvar landlimoj proponas enmergiĝon en pasinteco, kie limoj estis samtempe disigaj linioj kaj renkontiĝejoj. Ĝi estas invito pripensi pri identeco, suvereneco kaj kunlaboro inter popoloj.

Ekzistas leginda artikolo en Vikipedio pri Moresnet; vidu

<https://mallonge.net/moresnet>

La zinkomuzeo

La Muzeo *Vieille Montagne* traktas la historion de la zinko-minejo en la regiono de Kelmis, kaj ĝiaj politikaj, sociaj kaj ekonomiaj konsekvencoj. Ĝi atestas ankaŭ pri la nekredebla historio de la neŭtrala teritorio de Moresnet (1816-1919) kaj pri la kreo de la S.A. Vieille Montagne (VM) en la jaro 1837.

La nova muzeo situas en la ĉefstrato de Neu-Moresnet, Kelmis (*Lütticher Straße 278, 4721 Kelmis, Belgio*) en la malnova estrara konstruaĵo de S.A. Vieille Montagne, en la iama mineja ejo. La nova muzeo havas zinkan tegmenton, kiu estis instalita kiel parto de la renovigaj laboroj en 2018.

Muzea kolekto

La muzeo havas du etaĝojn kaj posedas kolekton kun ĉiuj specoj de

ercoj rilataj al Neŭtrala Moresneto. Unu ĉambro estas rezervita por geologio kaj geologiaj konsekvencoj (inkluzive de poluado). La parto de la malnova stacidomo gastigas lokan historian ekspozicion de la asocio *La Calamine 1871*, kun fokuso al la fervoja historio. Multaj ekspozicioj okazos dum la tuta jaro. Dum nia kongreso escepte okazos gvidado en Esperanto!

Esperanto en la muzeo

Esperanto kaj Amikejo ne estis forgesataj kun tekstoj, fotoj, sonaĵoj, malpli ol en la eksa Geuldalmuzeo (nun fermita), sed laŭ pli moderna, nuntempa prezentado kaj en muzeo pli vizitata. Ĝi estas parto de la Esperanto-heredaĵo.



La labirinto

En la trilanda punkto inter Nederlando, Belgio kaj Germanio troviĝas unu el la plej konataj vidindaĵoj de la regiono: la granda labirinto. Ĝi estas natura, verda labirinto konstruita el altaj heĝoj, kiuj kreas kuriozan reton da vojoj. Vizitantoj povas eniri ĝin por sperti aventuron serĉante la ĝustan elirejon. Survoje ili renkontas ne nur senelirejojn, sed ankaŭ fontanojn, pontetojn kaj platformojn, kiuj donas belan superrigardon de la komplekso.

La labirinto ne estas nur distraĵo por

infanoj: ankaŭ plenkreskuloj ĝuas la defion. Multaj homoj partoprenas en ludoj, kiel serĉado de kaŝitaj statuoj aŭ respondo al enigmoj. Ĉar ĝi troviĝas ĝuste ĉe la limoj de tri landoj, la loko havas simbolecan signifon: vizitantoj povas paŝi el unu ŝtato en alian dum kelkaj sekundoj.

La labirinto, kune kun la vidoturo kaj la pejzaĝa parko ĉirkaŭe, fariĝis populara turisma celo. Ĝi invitas homojn ne nur perdiĝi inter heĝoj, sed ankaŭ ĝui la unikan senton stari en tri landoj samtempe.



Dum preparvizito al Neŭtrala Moresnet, la organiza teamo faris ĉi tiun foton en la labirinto. Tie eĉ troviĝas “Turo de Amikejo”!

Ekspozicio "Rezisti la militan propagandon"

Dum la kongreso estos 30 paneloj de la ekspozicio "Rezisti la militan propagandon" en la germana kaj angla lingvo. Jen la 10 principoj de Anne Morelli, kiu ankaŭ prelegos pri la temo.

1. Ni ne volas militon, ni nur defendas nin mem!
2. Nia malamiko tute respondecas pri ĉi tiu milito!
3. La gvidanto de nia malamiko estas esence malbona kaj similas al la diablo.
4. Ni defendas noblan aferon, ne niajn apartajn interesojn!
5. La malamikoj konscie faras terur-aĵojn; se ni faras erarojn, tio okazas nevole.
6. La malamiko uzas malpermesitajn, kontraŭleĝajn armilojn.
7. Ni suferas malmultajn perdojn, la perdoj de la malamiko estas konsiderindaj.
8. Agnitaj intelektuloj kaj artistoj subtenas nian kaŭzon.
9. Nia kaŭzo estas sankta.
10. Kiu ajn dubigas nian propagandon, helpas la malamikon kaj estas perfidulo.



Anne Morelli

Anne Morelli estas belga historiisto kaj esploristino, konata pro sia laboro en la kampo de konflikthistorio, pacstudoj kaj propagandanalizo. Ŝi instruas kaj verkas pri temoj kiel militoj, politika propagando, interhomaj rajtoj kaj internaciaj konfliktoj, kontribuante al pli profunda kompreno de sociaj kaj politikaj fenomenoj.

Ŝi publikigis plurajn librojn kaj artikolojn pri historio de konfliktoj kaj pacmovadoj, kiuj estas ofte referencataj en universitatoj kaj esplorcentroj. Anne Morelli estas invitata por prelegoj kaj seminarioj en internaciaj aranĝoj, kie ŝi kombinas teoriajn analizojn kun praktikaj ekzemploj por montri la mekanismojn de konfliktoj kaj propagando.

Ŝi ankaŭ gvidas kursojn, laborsesiojn kaj trejnadojn en internaciaj aranĝoj, celante instrui kritikan analizon kaj historian metodikon. Ŝiaj prelegoj kaj seminarioj estas desegnitaj por faciligi interagadon inter studentoj, esploristoj kaj profesiuloj el diversaj landoj, provizante spacon por diskuto kaj interŝanĝo de ideoj.

La laboro de Anne Morelli estas vaste respektata pro sia klaro, profunda esploro kaj la kapablo konekti historian analizon kun aktuala politika kaj



socia praktiko. Ŝiaj kontribuoj helpas edukantojn, studentojn kaj fakulojn pli bone kompreni la dinamikon de konfliktoj kaj la rolon de propagando tra la historio.



La EU-programo Erasmus+ subvencias nian kongreson

Lastmomente (ekzakte la 29-an de aŭgusto) Germana Esperanto-Asocio ricevis informon ke la germana Erasmus+ -agentejo pozitive decidis pri subvencipeto por projekto, kiu enhavas la kongreson en Schleiden. Erasmus+ estas programo de Eŭropa Unio, kiu finance subtenas i.a. klerigadon de plenkreskuloj kun eŭropa dimensio. La projekto havas la titolon « *Paco per interkompreniĝo : kiel fortigi partnerajn rilatojn?* ». Partneroj en tiu projekto de GEA estas la Esperanto-asocioj de Valonio kaj Nederlando. Komenca dato estas la 1-a de septembro 2025; la projekto finiĝos en majo 2026 per konkluda kunveno en Valonio.

La progreso de naciismaj movadoj en multaj eŭropaj landoj ilustras la bezonon fortigi la strukturojn por internacia kunlaboro kaj intensigi kontaktojn inter individuoj kaj asocioj. Esperanto-asocioj siamaniere

taŭgas por tiu celo, ĉar ili kunigas membrojn interesitajn pri internacia kunlaboro, kiuj dediĉas sin al subteno de paco kaj interkompreniĝo. Ĉi tiu projekto servu al reciproka informado pri la kontribuo de esperantistoj al kontaktoj inter civitanoj en Eŭropo. Samtempe ĝi helpu konsciigi pri aktualaj defioj, kiuj minacas pacon kaj kunlaboron. Ambaŭ temoj reflektiĝas en la programo de la kongreso. La projekto efiku internen, sed ankaŭ diskonigu al pli vasta publiko la valoron de la Internacia Lingvo, kaj la kontribuojn de la Esperanto-movado kaj individuaj esperantistoj.

La pozitiva respondo al nia subvencipeto plian fojon montras ke la laboro de la Esperanto-movado estas rekonata. Esperantistoj ofte mem ne konscias pri tio! Por la kongreso ĝi ebligas solide financi la programon kaj repagi al la partoprenantoj parton de iliaj kotizoj.

Ulrich Brandenburg



Kofinanziert von der
Europäischen Union

Von der Europäischen Union finanziert. Die geäußerten Ansichten und Meinungen entsprechen jedoch ausschließlich denen des Autors bzw. der Autoren und spiegeln nicht zwingend die der Europäischen Union oder der Europäischen Exekutivagentur für Bildung und Kultur (EACEA) wider. Weder die Europäische Union noch die EACEA können dafür verantwortlich gemacht werden.

Vogelsang

Kadre de nia kongreso en Schleiden, vi havos la unikan ŝancon viziti Vogelsang, lokon kie historio, edukado kaj naturo kuniĝas en impona maniero. Situanta en la koro de la Eifel-nacia parko, Vogelsang estas ne nur fascina historia komplekso, sed ankaŭ moderna centro por kultura interŝanĝo kaj kritika reflektado pri nia komuna estonteco.

Vogelsang estis origine konstruita en la 1930-aj jaroj kiel unu el la tri grandaj trejncentroj por la nazia partio. Ĝi servis kiel simbolo de potenco kaj ideologia trejnejo por la estonta “elito” de la reĝimo. Post la Dua Mondmilito, la komplekso estis uzata dum jardekoj kiel militista bazo de la brita kaj poste belga armeoj. Nur en 2006 la areo remalfermiĝis por la publiko kaj ricevis novan identecon

kiel Internacia Loko – Vogelsang IP, celante transformi lokon de propagando kaj milito en spacon de toleremo, diverseco kaj kompreno.

Dum la ekskurso vi havos la ŝancon grimpi al la 48-metra turo, de kie malfermiĝas nekredeblaj panoramaj vidoj super la Urft-lageto kaj la ĉirkaŭaj montetoj de la Eifel.

Vizito al Vogelsang IP ne estas nur turisma ekskurso – ĝi estas vojaĝo tra historio kaj inspiro por la estonteco. La impona arkitekturo, la potenca natura pejzaĝo kaj la pensigaj ekspozicioj kune kreas sperton, kiu restos en la memoro de ĉiuj partoprenantoj. Ĉi tiu vizito perfekte kompletigas la spiriton de nia kongreso en Schleiden: lerni, diskuti kaj konstrui pli kompreneman kaj kunlaboran mondon.



Ulrich Lins (naskita en 1943) estas historiisto, kiu specialiĝis interalie pri la historio de Esperanto. Inter esperantistoj li konatiĝis kiel kunredaktoro de *Esperanto en perspektivo* (1974) kaj kiel aŭtoro de *La danĝera lingvo* (unua eldono en 1973, kun pluraj nacilingvaj tradukoj). Dum multaj jaroj li kunlaboris en la estraroj de TEJO kaj UEA, kies vicprezidanto li estis inter 1989 kaj 1995. Profesie li laboris ĉe la Germana Servo por la Interŝanĝo de Universitataj Studentoj (DAAD). En 1978 li fariĝis la unua estro de ĝia oficejo en Tokio. Poste li prizorgis en Bonn la universitatajn rilatojn interalie kun Sovetunio kaj Orienta Eŭropo. De 1999 ĝis 2004 li denove laboris en Tokio.

La instruo de persekutoj: la aktualeco de Esperanto

Antaŭ sesdek jaroj mi komencis okupiĝi pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Rezultis el tio la libro La danĝera lingvo, pri kiu la revuo Esperantologio lastatempe resumis, ke ĝi donas instruon pri la agopovo de lingvoj kaj aparte montras, ke Esperanto estis potenciala minaco por nacie bazitaj ŝtatoj. Por mi mem en tiu ĉi kunteksto aparte gravis unu aspekto: la batalo de ideologioj. Unue temis pri la nazia reĝimo, poste ankaŭ pri la sovetia komunismo.

Esperantologio levis demandon, ĉu ne malaktualiĝis la temo, ĉar nun ne plu estas persekutoj kontraŭ



Esperanto. Sed ĉu pasis ankaŭ la kialoj, pro kiuj diversaj reĝimoj persekutis esperantistojn? Tiun demandon eblas parte jese respondi, ĉar malaperis la nazia reĝimo. Sed kio pri Sovetunio? Dauris longe, ĝis oni tie entute ektraktis la temon de persekutoj sub Stalin, kaj nun, pro la politika evoluo, ŝajnas ke revenas la tendenco prisilenti aŭ bagateligi la subpremon de la Esperanto-movado.


Iuj rekte kontraŭas la komparon de la reĝimoj de Hitler kaj Stalin, ĉar tio, laŭ ili, riskas malgrandigi la teruron de faŝismo kaj naziismo kaj insulti socialismon, kiu malgraŭ eraroj kaj misoj ĉiam altetenis la flagon de kontraŭfaŝismo. Detlev Blanke, kiu komence esprimis dubojn pri la utilo de miaj esploroj, fine de sia vivo formulis juĝon, kiu antaŭe estus konsiderata de multaj neakceptebla: Blanke konfesis, ke la persekutoj kontraŭ esperantistoj sub Stalin kvante kaj kvalite eĉ superis tiujn sub Hitler.

La rigardo al historio daŭre ŝanĝiĝas depende de la malkovro de dokumentoj aŭ de aktualaj evoluoj. Pri tio mi lastatempe ekpensis sub la impreso de la milito en Ukrainio. En mia libro mi menciis, ke en 1930/31 la ukraina verkisto Volodymyr Sosjura faris herezan proponon, nome ke Esperanto, ne la rusa lingvo, estu komuna lingvo en Sovetunio. Liaj argumentoj (kiujn la tiamaj sovetiaj esperantistaj superuloj tuj flankenŝovis kaj kondamnis) estis, laŭ la franco Michel Duc Goninaz, pure Zamenhofaj, nome bazitaj sur la idealo de lingva egalrajteco.

En tiu ĉi kunteksto alia esploristo, la kataluno Hector Alòs i Font, memorigis pri la elstara rolo, kiun ludis ukrainaj esperantistoj en la

historio de Esperanto, atentigante, ke el la membroj de la Sovetrespublikara Esperantista Unio pli ol duono organizite apartenis al Ukrainio.

Tio kvazaŭ aktuale memorigas, ke Zamenhof luktis konsekvence kaj plej energie kontraŭ naciismo. Li ne estis tre sukcesa, pri kio oni jam ofte atentigis. Nuntempe Esperanto certe ne plu estas “danĝera lingvo”, sed restas en la mondo evoluoj, kiuj maltrankviligas – evoluoj, kiuj minacas pacan vivon sur nia Tero kaj la konkordon inter nacioj. Tial oni devas des pli forte emfazi, ke la transvivado de Esperanto, malgraŭ teruraj persekutoj, estis granda sukceso kaj inspiras nin plulabori, konsciante la heredaĵon de Zamenhof.



JoMo estas sendube tio kion oni povas nomi poliglota kaj senlaca muzikisto. En la 80-aj jaroj, li estis kantisto kaj gitaristo de la roktriopo Les Rosemary's Babies, kun kiu li multfoje koncertis. Tiam, de rokkantisto li iom post iom iĝis konata ankaŭ kiel unu el la plej aktivaj figuroj en la esperanta muzika mondo, ĉiam kun sia gitara energio. Li travojaĝis Eŭropon, Azion, Amerikon kaj Aŭstralion por prezentiĝi ĉe esperantistaj festivaloj kaj renkontiĝoj, kie lia sceneja karismo baldaŭ fariĝis legenda.



Iom poste, estis la multlingveco kiu difinis lian vojon, ĉar JoMo famiĝis pro sia kapablo kanti en pli ol dudek lingvoj. Tiu fenomeno alportis al li eĉ lokon en Guinness-libro de rekordoj. De Esperanto ĝis minoritataj eŭropaj idiomoj tra ekzotaj lingvoj, lia repertuaro estas transiro al alia nivelo de kulturo kaj videbleco, ĉar li prezentis sin ĉe multaj internaciaj festivaloj, foje kiel reprezentanto de la lingva diverseco mem.

Kun pluraj albumoj, inter kiuj *JoMo Friponas!* kaj la kompilaĵo *JoMo en koncert'*, li firmigis sian reputacion kiel muzikisto, kiu kapablas samtempe esti distra kaj instrua. La energio de liaj kantoj, ofte miksentaj rokon, popolmuzikon kaj ŝatigan refreton, estas ankaŭ pordo al konateco de Esperanto por neesperantistoj.

JoMo fakas pri historio, sed profesie li estas muzikisto. Kiel kantistomondvojaĝanto, li estas ĉiam preta adapti sian repertuaron al la publiko kaj la kunteksto. La lingvoj estas por li instrumentoj same kiel la gitaro, per kiuj li esploras la mondon kaj ligas homojn.

Esperanto jam frue fariĝis lia dua hejmo, kaj ĝi donis al li la scenejon kie li povis plene esprimi la ĝojon kanti kaj kunhavi. La ideo prezenti sin kiel “kantisto de ĉiuj lingvoj” naskiĝis el tiu sperto, kaj ĝi plu akompanas lin en ĉiu nova projekto.

Temas do pri vera ambasadoro de muziko kaj lingva diverseco, por kiu Esperanto estas ne nur ilo, sed ankaŭ koro de lia artisma vojo.

Katalin Kováts



Katalin Kováts estas hungara esperantisto, pedagogo kaj lingvisto, konata pro sia forta engaĝiĝo en la instruado kaj disvastigo de Esperanto. Ŝi verkis doktorigan disertacion pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kaj estas fakulo pri lingvoinstruada metodologio. De 2001, loĝante en Nederlando, ŝi fondis kaj direktas la influan retpaĝaron edukado.net, kiu servas kiel centra komunumo por instruistoj kaj lernantoj, kun miloj da materialoj kaj aktiva reto de instruistoj el pli ol cent landoj.

Inter 2007 kaj 2022 ŝi estis membro de la Akademio de Esperanto. Ekde 2009 ŝi ellaboris la KER-ekzamenan sistemon por Esperantujo, organizas la sesiojn kaj ekzamenas. Ĝis septembro 2025 akiris KER-atestilojn 2888 personoj el 84 landoj, inkluzive de la plej alta nivelo C2. Danke al ŝia laboro ekde 2022 eblas trapasi ankaŭ rete la ekzamenojn, kio signife pligrandigas la ekzameneblojn.

Ŝi estas ankaŭ la kreinto de la programo Ekparolu!, kiu helpas komencantojn praktiki Esperanton kun spertuloj tra la mondo, kaj la populara reta ludo RISKO, kiun ĉiutage ĝuas plurcent uzantoj.

Katalin gvidas kursojn kaj instruistajn trejnadojn en internaciaj aranĝoj. Ŝia instruado okazis jam en pli ol tridek landoj kaj dum preskaŭ ĉiuj Universalaj Kongresoj dum la lastaj du jardekoj. Ankaŭ dum la Gebeneluksa Kongreso Katalin Kováts kaj ŝia edzo Sylvain Lelarge **prizorgas lingvo-kursojn.**



Zdravka Boytcheva

Zdravka Boytcheva estas senlaca aktivulo kaj muzika animiganto en la Esperanto-movado. Ekde jaroj ŝi gvidas kaj inspiras korusojn, muzikajn atelierojn kaj kulturajn programojn dum diversaj internaciaj aranĝoj, inter kiuj Universalaj Kongresoj kaj regionaj renkontiĝoj. Per sia energia gvidado kaj varma personeco, ŝi sukcesas krei spacon kie kantado kaj komunumo kuniĝas. En 2025, dum la Universala Kongreso en Brno, ŝi eniris la estraron de UEA, kie ŝi respondecas pri la fakoj Kulturo kaj Eldona Agado. Zdravka daŭre kombinas sian pasion por muziko kun senlaca laboro por plivivigi kaj riĉigi



la kulturalan dimension de la tutmonda Esperantujo.

Kristin Tytgat

Kristin Tytgat estas denaska esperantistino el Antverpeno. Ŝi studis filologion de ĝermanaj kaj slavaj lingvoj. Profesie, ŝi instruis la germanan lingvon kaj kursojn pri tradukado kaj interpretado en la Libera Universitato de Bruselo. La laboro de Kristin por la Esperanto-komunumo estas vaste rekonita kaj aprezata. Kristin estas interalie eksprezidanto de Belga Esperanto-Federacio kaj okazigis multajn Esperanto-kursojn kaj prelegojn pri lingvaj temoj en pluraj eŭropaj landoj. Ŝi ankaŭ kontribuas al la interlingvistika kampo, prelegante



pri temoj kiel plurlingveco kaj lingva konscio. Dum la kongreso ŝi **gvidos paroligajn rondojn**.



UK.ESPERANTO.NET

GRAZ, AŬSTRIO
1-8 DE AŬGUSTO 2026

111-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO



Bernard-Régis Larue

Bernard-Régis Larue estas franc-devena belga esperantisto, kiu aktive kontribuas al la Esperanto-komunumo en Bruselo. Li estas prezidanto de la Esperantista Brusela Grupo, unu el la plej aktivaj Esperanto-klubo en Belgio.

Bernard-Régis ofte prelegas pri diversaj temoj, inter kiuj estas historio, geografio, kartografio, astronomio kaj kulturo. La prelegoj de Bernard-Régis estas tre aprezataj pro siaj klaraj prezentoj kaj la kapablo stimuli pensadon kaj diskuton. La temo de la prelego de Bernard-Régis dum nia kongreso estas **Moresnet kaj Euregio**.



Aleksej Salomatov

Aleksej Salomatov esperantistiĝis en 1989. Li fondis en 1990 turisman firmaon en Moskvo, organizis karavanojn al Esperanto-aranĝoj. Poste la firmao specialiĝis pri Finnlando kaj Skandinavio. Ekde 2005 li ankaŭ agas kiel fotisto. Okazis personaj ekspozicioj en Moskvo kaj Murmansk. Kelkaj fotoj estis prezentitaj en galerioj de Londono kaj Kioto. Post emeritiĝo en 2019 Aleksej aktive okupiĝas pri filmado kaj nun faris 11 dokumentajn filmojn, inter ili tri en Esperanto. Li estas aŭtoro kaj redaktoro de la rubriko “Arto” en la revuo Monato.

Aleksej **prezentos dokumentajn filmojn** dum la kongreso.



Filmoj dum la kongreso

Somero de Sigrid

La filmo rakontas pri 8-jaraĝa knabino Sigrid, kiu vivas kun siaj gepatroj en Alandaj Insuloj de Finnlando. Kun sia patrino ŝi vojaĝas al Svedio, kie partoprenas la internacian kurson de Esperanto-kulturo. La knabino facile komunikas kun homoj el diversaj landoj, inter tiuj Danio, Svedio, Belgio, Germanio, Pollando, Rusio, Kazahio kaj Sirio. En la filmo geedza paro, festanta 27 jarojn da geedzeco, rakontas la historion de ilia amo. Kiam ili renkontis dum la Esperanto-aranĝo, Eddy vivis en Belgio, kaj Ella en Pollando.

Muzikas en la filmo Kimo, Ĵomart kaj Nataŝa.

Verda Saliko

Aĝo ne estas malhelpo por 80-jara finna virino vivi aktivan kaj interesan vivon. Raita, kio signifas en la finna “saliko”, verkas artikolojn por Esperanto-revuoj, partoprenas kiel volontulo en la Universala kongreso en Lahti, prizorgas ŝatatajn florojn en sia loĝejo, montras al la eksterlandaj gastoj la somerdomon kun ĝardeno apud la Finna golfo...

Bedaŭrinde Saliko forpasis la 20-an de aŭgusto ĉi-jare.



Jen dek bonaj kialoj por aboni ĝin nun!

1

Por MONATO raportas ne eksterlandaj ĵurnalistoj, sed lokaj esperantistoj, kiuj konas la tieajn fonojn.

2

MONATO havigas plej variajn komentojn pri la mondaj novaĵoj.

3

En MONATO la intelektularo de la Esperanto-movado diskutas, fojfoje vigle polemikas pri gravaj temoj de la nuntempa socio.

4

MONATO estas la magazino en kiu ankaŭ vi povas aperigi viajn komentojn.

5

MONATO plilarĝigas vian spektron de interesigo, pro aro da nekutimaj temoj prezentitaj en facile digestebla maniero.

6

MONATO pligrandigas vian lingvokonon. Ĝi estas redaktata en bona hodiaŭa Esperanto.

7

MONATO jam dum 43 jaroj regule aperadas.

8

MONATO estas magazino sen amasa reklamo.

9

MONATO estas ellaborita ekde la redakto ĝis la forsendo, per la kranioj kaj la manoj de esperantistoj.

10

Per MONATO vi vivtenas kaj subtenas prestiĝan eron en la Esperanto-movado.

... kaj vi kiel nova abonanto nun ricevos MONATON dum 15 monatoj kontraŭ la prezo de nur unu jaro!

Mendu ĝin tie ĉi aŭ rete pere de www.monato.be/rabato!

Mezbakita



Mezbakita (Briardo kaj Delfeno) estas belga duopo kiu formiĝis en 2024. De tiam ili okupiĝis pri verki

kaj ludi proprajn kantojn por ilia lojala publiko, kiu ajn tio estu...
Instagramo: @mezbakita

Detlef Haußner



La ĝemelurba movado ofertas eblecojn konatiĝi kun aliaj geesperantistoj sed ankaŭ kun homoj kiuj ĝis nun ne scias, kio “Esperanto?” estas. Laŭ la ekzemplo de la urbo Darmstadt la prelegonto deziras prezenti la ideon de ĝemeliĝoj, kelkajn ekzemplerojn el la movado, la oficialan movadon de esperantistoj mem kaj finfine ni eble povas praktike diskuti la eblecojn por realigi projektojn surlokajn. UEA okupiĝas pri tiu movado jam multajn jarojn kaj per la ekzemplo de la venonta UK en 2026 ni eble havos novajn perspektivojn?

Grava historia asocio: Senlime

La translima asocio Senlime intencas progresigi la reciprokan internacian komprenon en la Eŭregiono Mozo-Rejno helpe de Esperanto.

Jam antaŭ la Dua Mondmilito esperantistoj el la tri najbaraj landoj renkontiĝis—biciklis, pasigis noktojn kune, kaj tiel naskiĝis la tiel nomataj Trilandaj Renkontiĝoj, kiuj ĉiujare okazis inter grupoj en Akeno, Verviers, Lieĝo kaj aliaj. La asocio Senlime estis formale fondita en 1993 en Kelmis (Belgio). Post fondiĝo, la asocio rapide organizis la Trilandajn Renkontiĝojn laŭ viciĝo inter la ĉefaj grupoj, sed de 2010 la tradicio jam ne plu efektiviĝis

kontinua, pro malpliigo de aktiveco en la lokaj grupoj. La lasta vera trilanda evento okazis en Weris (BE) en 2010.



Ĉu vi konas la Internacian Esperanto-arkivon?

Internacia Esperanto-Arkivo, mal-longe IEspA, celas: kolekti, arkivi, protekti, administri kaj fari alireblaj librojn, revuojn kaj aliajn dokumentojn kaj objektojn en kaj pri Esperanto kaj planitaj lingvoj, maksimume en ilia originala formo (apud diĝitaj kopioj). Tiu ĉi arkivo celas konservadon kiel heredaĵo, por nelimigita tempodaŭro.

Por realigi ĉi tiun celon, la asocio altiras arkivajn dokumentojn diversmaniere. Ĝi provizas medion (posedaĵon aŭ luadon) taŭgan por gardado en optimumaj kondiĉoj

koncerne klimaton, sekurecon kaj simile. Detala inventaro de la arkivaj dokumentoj estas daŭre ĝisdatigata. Principe ne disponeblas pruntado, la aliro eblas surloke aŭ per aliaj vojoj, ekzemple skano.

La fondintoj kaj samtempe la administrantoj estas Bert Boon, Roland Rotsaert kaj Marc Vanden Bempt. La kolekto troviĝas en Belgio, en la urbo Diest. Tie IEspA en 2024 sukcesis aĉeti taŭgan arkivejon kun oficejo kaj aldone ludonebla apartamento.

www.iespa.eu

Junuloj en la kongreso

KEKSO estas evento por adoleskuloj kaj junaj plenkreskuloj, kiuj ŝatus kune lerni kaj paroli Esperanton. Ĉi-foje KEKSO okazas paralele al la Gebeneluksa Kongreso. Tiel KEKSO-partoprenantoj povas samtempe profiti ankaŭ de la ĝenerala kongresa programo.

Komencantoj estas tre bonvenaj kaj povas surloke partopreni taŭgan lingvokurson. Paralele ankaŭ okazas

diversaj atelieroj kaj programeroj por progresintoj, kaj ekskurso. Dum la lasta KEKSO en Nurenbergo (Nürnberg) okazis ekzemple komuna kuirado, bakado de biskvitoj, ŝakturniro, urboludoj, kaj por kelkaj estis nokta vizito al la urbo por festumi ĝis la mateno. Pri la antaŭlasta KEKSO eĉ ekzistas oficiala 'Best-Of' kun amuzaj momentoj:

mallonge.net/BestOfKEKSO2024



35a Kreema Esperanto-Kurso

2a – 5a Okt. 2025

paralele al la Gebeneluksa Kongreso
en **Schleiden-Gemünd**

Ĝeneralaj asembleoj

Dum la Beneluksa Kongreso okazas ĝeneralaj membrokunvenoj de kvar Esperanto-asocioj. Jen eta prezento de ili:

Belga Esperanto-Federacio

Belga Esperanto-Federacio (BEF) estas la Landa Asocio de UEA en Belgio, fondita en 1962. BEF estas ekde 2005 defakta asocio. En ĝi membras Flandra Esperanto-Ligo (FEL), Valona Esperanto-Asocio (V.Esp-o), Esperantista Brusela Grupo (EBG) kaj la Verdaj Skoltoj (ekde marto 2015).

esperanto.be/bef



Germana Esperanto-Asocio

Germana Esperanto-Asocio (GEA) estas la Landa Asocio de UEA en Germanio. Ĝi estis fondita en 1906 kaj havas longan tradicion kiel unu el la plej aktivaj landaj movadoj en Eŭropo. Post la Dua Mondmilito, la asocio estis refondita en 1949.

GEA kunordigas la landan agadon, subtenas lokajn grupojn kaj landajn federaciojn, kaj organizas la ĉiujaran Germana Esperanto-Kongreson, unu el la plej grandaj

landaj Esperanto-renkontiĝoj en la mondo. La asocio ankaŭ eldonas la revuon *Esperanto aktuell* kaj subtenas diversajn projektojn rilatajn al kulturo, lingvoinstruado kaj internacia kunlaboro.

Membroj de GEA estas kaj individuoj kaj lokaj asocioj, kunlabore kun regionaj federacioj. La asocio reprezentas Germanion ene de UEA kaj celas antaŭenigi la uzadon de Esperanto en la germana socio

esperanto.de



Valona Esperanto-Asocio

Valona Esperanto-asocio (V.Esp-o) estas senprofita asocio laŭ belga juro kies celo estas propagandi la Internacian Lingvon Esperanto en la franclingva parto de Belgio.

Ĝia alvokiĝo estas kunigi ĉiujn simpatiantojn kaj Esperanto-parolantojn en Valonio. Ĝi celas disvastigi la internacian lingvon pere de kursoj, prelegoj, kulturaj aranĝoj kaj renkontiĝoj por membroj kaj simpatiantoj.

Ĝeneralaj asembleoj

La asocio kunigas klubojn kaj individuajn aktivulojn en Valonio, subtenas la publikigon de materialoj en kaj pri Esperanto, kaj reprezentas la valonajn esperantistojn en landa kaj internacia kunlaboro. Per siaj iniciatoj, V.Esp-o laboras por pli granda videbleco de Esperanto en la franclingva socio de Belgio.

esperanto-wallonie.be/eo



Germana Esperanta Fervojista Asocio

Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) estas fako-asocio de fervojaj laboristoj kaj fervoj-amikoj en Germanio, kiuj uzas kaj subtenas Esperanton en sia internacia kontakto. Ĝi estis fondita en 1909 kiel parto de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF). Post la interrompo dum la mondmilitoj, la asocio estis refondita en 1949.

GEFA membrigas fervojistojn, transportlaboristojn kaj simpatiantojn, kaj ĝi organizas landajn kunvenojn, partoprenas en la Internaciaj Fervojistaj Esperanto-Semajnoj, kaj eldonas informilojn

pri sia agado. Kiel fakgrupo, GEFA celas plifortigi internacian kunlaboron inter fervojistoj kaj kontribui al la uzo de Esperanto en la fervoja medio. La asocio estas membro de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio kaj reprezentas Germanion en tiu internacia organizaĵo.

ifef.net



Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj

Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) (kun sidejo en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo) estas unu el la plej multnombraj landaj sekcioj de ILEI. Ĝi estas memstara komunutila asocio, kunlaboras kun Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj Germana Esperanto-Instituto (GEI). AGEI organizas fakajn kunvenojn, instigas al verkado de fakartikoloj kaj aliaj verkoj, donas helpon, konsilojn al siaj membroj. Gravas ankaŭ la konsultado pri instruagado, metodikadidaktika helpo al gekolegoj, spertinterŝanĝo pri lerneja kaj eksterlerneja Esperanto-instruado.

Nia jarĉefkunveno estas publika, bonvenon al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri instruado de Esperanto, disvastigo de la internacia lingvo.

agei.esperanto-urbo.de

Luminesk'

LUMINESK' estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio. Ĝi nun okazos la okan fojon en Bingen de la 28-a de decembro 2025 ĝis la 3-a de januaro 2026. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan programon – lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7 ĝis 8 landoj.



Germana Kongreso 2026

Jam ekzistas dato kaj loko de la Germana Esperanto-Kongreso en 2026!

La GEK 2026 okazos kunlabore kun Ĉeĥio, Slovakio kaj Aŭstrio en Břeclav, Ĉeĥio dum pentekosto 2026, do de la 22-a ĝis 25-a de majo 2026.



Beneluxsa Kongreso en De Haan

En 2026 la Beneluxsa Kongreso okazos en De Haan (BE) **de la 24-a ĝis la 28-a de septembro**. La renkontiĝo okazos en tute renovigita gastejo kiu situas proksime de komforta sablostrando, ideala por familioj kun infanoj. De Haan estas ĉarma, belepoka urbeto de la belga marbordo. Ĝi troviĝas je 20 km de Ostendo kaj 30 km de Bruĝo.

Ĉefaj ingrediencoj de la kongreso: kursoj kaj ekskursoj - muziko kaj poezio - aktivecoj sur la strando - bonvenigaj aktivecoj por ne-esperantistoj.



Zamenhoffesto en Antverpeno

Ĉu plaĉis al vi la kongreso? Planu jam vian venontan Esperanto-eventon!
Zamenhoffesto | sabato 13-a de decembro 2025 | Antverpeno | 10:00 ĝis 18:00, aŭ pli poste

Ĉi-jare, la antverpena klubo La Verda Stelo organizas la tutbelgian Zamenhoffeston. En renovigita hospitalsalono el 1880, ni flegos vin per bona manĝo, koncerto de Kajto, libroservo kaj vasta ebleco babili kun la aliaj. Kun bona vetero certe ĝuu la ĝardenon. En la vespero, por tiuj kiuj volas/povas, ni translokiĝos al nia propra apuda sidejo por pliaj surprizoj kaj etoso!

Kotizo ĝis 13-a de novembro estas € 55 (infanoj ĝis 12j la duono), poste + € 5. Aliĝu ĉe esperanto-antwerpen@esperanto.be (nomo, nombro, manĝo vianda, vegetara aŭ vegana); aliĝo validas post ĝiro al BE60 9792 1479 3670, nome de La Verda Stelo, Antwerpen. **venu VENU por unika okazaĵo en unika loko!**

Listo de aliĝintoj

Jen listo de aliĝintoj je la 17-a de septembro 2025. Temas pri 126 personoj.

Annet Jean	Flory Witdoeckt
Beckmann Markus	Fontaine Joel
Blanke Wera	Galle Ulla
Bludau Norbert	Giebner Werner
Boytcheva Zdravka	Glorieux Piet
Brandenburg Barbara	Gramelspacher Konrad
Brandenburg Guido	Groen Werner
Brandenburg Martina	Gruner Horst
Brandenburg Ulrich	Haase Martin
Brockmeier Frank	Haerick Patrick
Brüggemeier Martin	Haußner Detlef
Buchenthal Sascha	Hilgemann Petra
Bünemann Ernst	Hovinga Foppe-Klaas
Chumak Nataliya	Höpken Anne
Cornelis Jenny	Humet Alex
Cremer Julie	Huthmann Christel
Cuffez Marc	Huthmann Dirk
Delnat Hans	Indestege Ben
Despeyroux Isabelle	Izacard Didier
Diemel Andreas	Jacques Gerd
Doumont Valère	Jacques Ilse
Draime Jeanne	Junghans Elena
Droog Marie (Marilyn)	Junghans Norbert
Duhme Alexandra	Kampmann Dorle
Ehrlich Bodo	Klein Ursula
Emmelkamp Ineke	Klose Karin
Emmerich Andreas	Kocieba Iwona
Ender Ulrich	Kotyrba Ellen
Ertl István	Kotyrba Wolfgang
Ertl Liina	Kováts Katalin
Fischer-Sorg Simone	Kóródy Zsófia
Fitzelová Ev	Kranz Brigitte

Listo de aliĝintoj

Krieghoff Stefan	Ronin Vladimir
Kruse Franz	Royaux Catherine
Kuhl-Kruse Elisabeth	Salomatov Aleksei
Kusters Eduard	Schäfer Jasmina
Lando José Sangila	Schlautmann Henning
Larue Bernard-Régis	Schmitz Harald
Lelarge Sylvain	Schwanzer Wolfgang
Leppert Iris	Singh Yashovardhan
Lepping Diana	Soloveva Marina
Lepping Stefan	Sprick Heinz
Leuschner Torsten	Stecay Hildegard
Lies Elke	Strug Ella
Lins Ulrich	Stryhn Meyer Jimmy
Lödör Katja	Symoens Margaretha
Maier Utho	Teruel Encarna
Manfred Westermayer	Thorenz Martin
Markova Olga	Tissot Maryse
Matheus Konrad	Tytgat Ite
Mesias Maria	Tytgat Kristin
Michaela Stegmaier	Ullmann Margarete
Moon Brian	Ullmann Walter
Möller Steffen	Ursula Niesert
Mueller Johannes	Van de Velde Lode
Nemes Eric	Vanderfeesten Emiel (Emilio)
Nevelsteen Yves	Vast Justin
Olijslagers An	Verriest Marine
Peeters Leen	Weiss Svetlana
Pepe Arsene	Weiss Werner
Pflüger Reinhard	Wichert Agnes
Pironnet Eliane	Winteraeken Ron
Poncelet Bernadette	Wolff Laure
Ramette Laurent	Wunsch-Rolshoven Lu

Redaktis kaj kompostis ĉi tiun kongreslibron por vi Yves Nevelsteen.
© Valona Esperanto-Asocio 2025



Erasmus+

Subtenida de la programo Erasmus+ de la
Eŭropa Unio